

67 libroj: La plej magra jarrikolto

Ekde sia renaskiĝo “La Ondo de Esperanto” ĉiujare publikigas statistikon de la libro-produktado en Esperantujo, daŭrigante la iniciaton de Vilmos Benczik en “Hungara Vivo”. Por tiuj malmultaj, kiuj unuafoje abonas “La Ondon”, mi ripetu kelkajn enkondukajn frazojn, kiujn prefere ne legu niaj konstantaj abonantoj.

La bazo de nia statistiko estas la rubriko “Laste aperis” (LA) de la revuo “Esperanto”, en kiu estas registrataj ĉiuj paperaj libroj, kiujn la libroservo de UEA ekvendis dum la aktuala jaro. Tia statistiko ja estas kritikebla kaj kritikinda.

Unue, en LA estas registrataj libroj, eldonitaj pli frue sed ekvenditaj de UEA en la koncerna jaro. Tio povas doni misan bildon pri la revuata jaro, sed la resuma statistiko glatigas la fluktuaĵon kaj fidiinde vidigas la ĉefajn tendencojn en nia eldonado.

Due, la libroservo de UEA vendas ne ĉiujn novajn librojn, kaj en LA kutime mankas lerniloj eldonitaj por enlandaj bezonoj (ekzemple, lerniloj por ĉinoj) kaj etkvante eldonitaj broŝuroj, kiujn la aŭtoroj disvendas kaj disdonacas en siaj kluboj kaj renkontiĝoj. Same mankas en LA kongreslibroj, programbroŝuroj kaj jarlibroj, kiuj abunde aperas ne por vendado tra libroservoj, sed por disdono al la respektivaj kongresanoj kaj asocioj. Kaj kelkaj eldonejoj ne proponas siajn librojn al UEA.

Trie, ekster la statistiko restas la bitlibroj, kiujn oni ofertas sen zorgi pri paperaj eldonkostoj. Tio reduktas la paperan rikolton.

Sed mankas pli granda statistika bazo ol “Laste Aperis”. Vidu la rezulton.

	1991-2000	2001-2010	2011-2020	2021-2024	2025	91-2025 Sume aŭ averaĝe
Nombro de libroj en/pri Eo	2107	1913	1465	394	67	5.946
Suma paĝonombro	251.276	276.616	228.165	65.994	10.045	832.096
Averaĝa paĝonombro de libro	120,3	145,2	155,7	167,5	149,9	139,9
Averaĝa prezo de libro (eŭroj)	8,2	11,4	12,1	14,8	13,3	10,7
Lernolibroj, vortaroj k. s. pri Eo	296	307	172	22	6	803
Originala beletro	258	214	213	78	11	774
Traduka beletro	458	361	330	137	22	1308
Lingvistiko, esperantologio	229	211	174	30	2	646
Eo: historio, kulturo, movado...	241	299	173	41	8	762
Politiko, historio, socio	166	228	248	44	10	696
Scienco kaj tekniko	182	93	33	13	3	324
Religio	105	93	72	19	2	291
Aliaj temoj	172	107	50	8	3	340

Jaro	Libroj	Paĝoj
1991	222	26.091
1992	205	25.789
1993	136	18.511
1994	188	22.078
1995	200	23.345
1996	232	28.637
1997	273	27.727
1998	208	28.769
1999	208	24.460
2000	235	25.869
2001	222	31.520
2002	174	26.451
2003	224	28.424
2004	183	27.295
2005	159	23.780
2006	204	30.078
2007	184	31.183

Jaro	Libroj	Paĝoj
2008	158	25.381
2009	158	24.272
2010	204	28.232
2011	172	19.775
2012	153	23.144
2013	178	25.344
2014	107	14.024
2015	172	25.629
2016	189	32.323
2017	139	23.353
2018	127	19.483
2019	150	28.194
2020	78	16.906
2021	106	16.088
2022	100	15.871
2023	100	19.116
2024	88	14.919
2025	67	10.045

En 2026 surmerkatiĝis 67 libroj, nova malrekordo. La ĝenra distribuo (vidu la tabelon en la antaŭa paĝo) rekonfirmas, ke nun aperas malmultaj lerniloj, ja nun oni pli lernas Esperanton rete, sed ne per paperaj lernolibroj). La plej popularaj plu estas tradukitaj beletraĵoj.

Denove sen EAB. Sed tio ŝanĝiĝos en 2026

Ankaŭ malrekorde, nur 11 eldonejoj produktis almenaŭ du librojn jare. Mondial plu estas plej supre kun 12 libroj, inkluzive de “Beletraj Almanakoj”. Sekvas Dokumenta Esperanto-Centro kun sep libroj. La tria devintus esti Esperanto-Asocio de Britio kun kvar libroj, pri kiuj Tim Owen rakontas en ĉi tiu “Ondo” (p. 108-112), sed ilin LA ne menciis, tamen – jen, novaĵo! – du el ili estas en la februara LA por 2026.

2025. Libroj

Mondial (Usono)
DEC (Kroatio)
E. Macko (Hungario)
Horizonto (Japanio)

2025. Paĝoj

12 Mondial
7 E. Macko
3 DEC
3 MSD

2119
1022
914
538

Ĝi estas demonstra versio de la 108-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>